

al vi, ke butero ne taŭgos por la radaro?" Dirante tion li turnis tre indignan rigardon sur la Martleporon.

"Nur la plej bonkvalitan mi uzis" protestis la Martleporo.

"Jes, sed kune kun la butero kelkaj paneroj nepre eniĝis" la alia riproĉe diris, "vi ne devis enigi ĝin per la pantranĉilo."

La Martleporo prenis la horloĝon, kaj malĝoje observis ĝin; poste li trempis ĝin en sian tason, kaj denove observis. Tamen li ne povis elpensi ion pli dirindan ol la antaŭa diro:—

"Nur la plej bonan buteron mi uzis."

Alicio scivole rigardis la poŝhorloĝon trans lia ŝultro. "Jen tre kurioza horloĝo" ŝi ekkriis "ĝi ja indikas la monatdatojn, kaj la horojn ĝi ne indikas."

"Pro kio ĝi devas?" la Ĉapelisto demandis. "Ĉu via poŝhorloĝo montras por vi la jarojn?"

"Kompreneble ne!" Alicio tre flue respondis. "Ĉar se ĝi montrus la jarojn, ĝi devus indiki dum tre longa tempo la saman ciferon."

"Kaj ĝuste tiun fakton vi povus konstati pri la mia" diris la Ĉapelisto.

Alicio tute konfuziĝis. La lasta diro de l' Ĉapelisto, kvankam ne malbona Esperantaĵo,

ŝajnis al ŝi konduki nenien. Ŝi nur diris ĝentile: "Mi ne komprenas."

"La Gliro ree endormiĝis" diris la Ĉapelisto, kaj verŝis sur ĝian nazon iom da varma teo. Ĉe tio, la Gliro malpacience skuis la kapon, kaj diris, ne malferminte la okulojn:—

"Ja, kompreneble! Ĝuste tion mi mem intencis diri."

"Ĉu vi jam solvis la enigmon?" demandis la Ĉapelisto, denove turnante sin al Alicio.

"Ne, mi fordonas la solvon" diris Alicio. "Diru al mi la solvon."

"Mi ne havas pri la solvo eĉ la plej malklarajn ideojn" li respondis.

— "Ne ekzistas solvo" diris la Martleporo.

Alicio ekĝemis enue. "Mi opinias" ŝi diris "ke vi devas pli bone uzi la tempon ol malŝpari ĝin proponante ne solveblajn enigmojn.

"Se vi konus la Tempon tiel bone kiel mi" diris la Ĉapelisto "vi ne uzus 'ĝi' priparolante 'lin.'"

"Mi ne komprenas" diris Alicio.

"Verŝajne ne" diris la Ĉapelisto, balancante la kapon malestime. "Mi kuraĝus diri ke neniam vi eĉ parolis al Tempo?"¹

¹ La angla frazeto kiun uzis la Ĉapelisto estas dusencaĵo kies ordinara signifo estas "paroli ĝis fiksita templimo ekze 10 minutojn"; ĝi povas ankaŭ signifi "alparoli Tempon."